

CIRKULERO DE SUDBOHEMIA ESPERANTISTA JUNULARO

La bildeto montras kastelon Hluboká. Ĝi estas konstruita sur la loko de citadelo Frobürg (aŭ Fronbürg – Frauenbürg), kiu estis fondita en la XIIIa jarcento de ĉeĥa reĝo Otakar II. Posedanto de tiu citadelo kelkfoje ŝanĝiĝis. Post la blankmonta katastrofo aĉetis ĝin generalo Baltazar de Marradas kaj en la jaro 1664 transiris fortikaĵo en proprajn de Jan Ad. grafo de Schwanzenberg. Kaj en la jaro 1838 oni komencis konstrui nunan kastelon Hluboká. La projekto estis farita en la tudora stilo laŭ la reĝa kastelo de Windsor en Anglujo. Propra kastelo estas trietaĝa konstruaĵo, ortangulplana kun 2 kortegoj. Ĉirkaŭ ĝi amasiĝas 11 altaj kaj malaltaj turoj kaj bastionoj. La kastelo estas ĉirkaŭita per ĉarma parko kun fontanoj kaj altanoj.

Hluboká situas proksimume 8 km piede aŭ oni povas veturi aŭtobude aŭ vagonare (direkto Ĉ. Budějovice – Praha aŭ Ĉ. Budějovice – Plzeň).

- Lupo -

EL AGADO DE KLUBO "LA PROGRESO" :

ESPERANTO-klubo de Ĉ. Budějovice en sia komitatkunveno la 19-an de marto decidis varbadi siajn gemembrojn al EAĈSR kaj pri preparo de ekspozicio el poŝtmarkoj kaj korespondenco, kiu okazos kun ekspozicio de filatelistoj en urba muzeo la 4-an de majo.

La kunvenprograramoj por dua jarkvarono estos jenaj:

- 3.4. Preparo de programo por dua jarkvarono.
- 10.4. Inĝ. Ladislav Krajíc: Pri Fundamento de Esperanto. Krom tio – rememoro al morttago de L.L.Zamenhof.
- 17.4. Inĝ. Ladislav Krajíc: Pri aviada terminaro en Esperanto.
- 24.4. Ladislav Lipert: Pri filatelio.
- 1.5. FESTO DE LABORO. Kunveno ne okazos.
- 8.5. SOLENA VESPERO (Programo - ĉefa ekzameno por amuzvespero de Junularkonferenco.)
- 15.5. Jana Remsová: Biografio de poeto Jiří Wolker kun tradukoj el lia verko.
- 22.5. Ludvík Bezděka: Pri astronomio kun projektado de lumbildoj /II-a parte/.
- 29.5. Karel Hofhansel: El historio de nia klubo /II-a parto/.
- 5.6. František Nymburský: Fabrikado de papero.
- 12.6. Věra Hubáčková: Pri keramiko.
- 19.6. Miloslav Vlk: Pri Esperantigita ĉeĥa literaturo kun ekzemploj.
- 26.6. Vladimír Novotný: Pri grafologio.

KION FARAS NIA JUNULARO???

11 anojn el ni kaj unu pli maljuna membro de nia klubo vizitis JUNULARO-konferencon la 1-an kaj 2-an de marto en Pardubice.

Nia JUNULARO sukcesis tie per sia programo, kiu konsistis el tradukitaj kantoj "Putima portalo" kaj "Laĝeto de Talin" kaj poste unuaktaĵo de Averĉenko "Silentema najbaro" /aktoris s-anoj František Nymburský kaj Miloslav Vlk/. Sa-no Vlk ankoraŭ ludis kun JUNULARO de Praha ĉeĥan ludeton "Řehákovo lože".

Dum laborkonferenco raportis por nia JUNULARO s-ano Novotný, kiu sciigis la partoprenantojn, ke en nia urbo ekzistis pli frue vigla Esperanto-movado, sed jam nuntempe ĝi denove kreskas, sekve fondigo de JUNULARO-grupo. Fine li ankaŭ invitis ĉiujn gesamideanojn al preparota JUNILARO-konferenco en Ĉes. Budějovice.

Laŭ informo de cirkulero "ESPERANTA VORTO" el Lanškroun ĉeestis la konferencon en Pardubice 78 personojn.

La 15-an kaj 16-an de marto s-ano Novotný vizitis Jozefvesperon kaj laborkonferencon en Hradec Králové.

Li denove parolis tie pri plibonigo de sudbonema-Esperanto-movado helpe JUNULARO-grupo. Li raportis, ke en Ĉ.Budějovice nuntempo estas kvar kursoj. Fine li invitis ĉiujn viziti la 17-an kaj 18-an de majo JUNULARO-konferencon en České Budějovice.

Pli maljunaj gesamideanoj ĝojigis el tio, ke en lokoj, kie nia movado jam malkreskis, denove JUNULARO vivigis ĝin, kiel ekzemple en Třebíč kaj České Budějovice.

Nia komencantkurso, gvidata de s-ano Novotný, bone daŭrigas. Ni perdis neniun, kontraŭe ni varbis du novajn geinteresulojn.

Nia JUNULARO havas jam 21 gemembrojn, el kiuj 6 ĉeestos prelegante en klubprogramoj.

Por ĉiu partoprenanto de nia konferenco ni preparas surprizon!

Ni bedaŭras, ke delegit/in/oj de nia regiono ne sendadas al ni raportojn. Sed ni esperas, ke ili vekigos!!!

ZK ROH POŠTOVNÍCH ZAMĚSTNANCŮ V Č. BUDĚJOVICÍCH, odbor ESPERANTO
zve Vás na

KRAJSKOU KONFERENCI JUNULARA

kteřa se bude pořádat 17. a 18. května 1952 ve schůzovní místnosti poštovních zaměstnanců v Č. BUDĚJOVICÍCH, Rooseveltova 447 - proti nádražní poště.

PROGRAM:

17. května v 19 hod.: Zábavný večírek s kulturním programem, v němž vystoupí budějovické JUNULARO a hosté.

18. května v 8 hod.: Pracovní konference JUNULARA, v níž promluví vedoucí budějovického JUNULARA, celostátní vedoucí, zástupce EAČSR, jihočeskí delegáti, mimokrajoví delegáti a program bude zakončen diskusí. Konec programu v 11 hodin.

Po programu následuje odjezd na zámek Hlubokou u Českých Budějovic, kde se bude i obědvat a odtud pak mohou někteří účastníci odjíždět přímo do svých domovů.

Těšíme se již na hojnou účast nejen všech mladých, ale i starších samidenů, které vždy rádi vidíme ve svém středu. Proto přijďte v hojném počtu a kdo můžete i na více dní, necht' poznáte jižní Čechy!

Noclehy zajistíme i na více dní.

Přihlášky zašlete nejpozději do 1. května 1952 na adresu: ESPERANTO-JUNULARO, Šumavská 250, Č. Budějovice!!!

Ĝis la revido!

Zdde odstřihněte a zašlete jako tiskopis v obálce

V dne 1952

Přihlašujeme členů našeho kroužku na KRAJSKOU KONFERENCI JUNULARA v Českých Budějovicích, konanou 17.-18. května 1952 a žádáme o objednání noclehů pro samideánky a pro samideány v společné noclehárně a pokojů jednolůžkových a pokojů dvoulůžkových v hotelu.

V případě neúčasti některého z přihlášených se zavazujeme objednaný nocleh zaplatiti.

Na sobotním zábavném večírku se zúčastníme – nezúčastníme programem.

Program současně přikládáme.

Adresa našeho kroužku

Nehodící se škrtněte!

.....
Podpis

PRI STENOGRAFIO.

Jan antaŭ jarcentoj homoj provis per skribo noti la homan parolon tiel rapide, kiel ĝi estas eldirata. La unua homo, kiu eksterordinare estris tian arton, estis Marcus Tullius Tiro, sensklavigito de la fama oratoro Cicero, kiu vivis en la unua jarcento a.K. Tamen stenografio en moderna senco aperis nur en la 16a jarcento en Anglio kaj de tie ĝi disvastiĝis en la ceteran mondon. Ĝia aŭtoro estis John Willis, vivinta en la tempo de Shakespeare. Lia stenografio estas nomata geometria, ĉar ĝi konsistis el rektlinio, cirklo kaj ĝiaj partoj.

Por ĉeĥoj kaj ceteraj slavoj la plej grandan signifon havis la grafika /t. e. sur elementoj de normala skribo bazita/ sistemo de germano Franz Xav. Gabelsberger /1789-1854/, kies stenografio, alfarita por la ĉeĥa kaj aliaj slavaj lingvoj superregis en la slava mondo ĝis jaroj post la unua mondmilito. En la historio de la ĉeĥa Gabelsbergera stenografio oni legas tiajn famajn nomojn kiaj Jindřich Fügner kaj Jan Evangelista Purkyně. La adapto, uzata dum pli ol 60 jaroj, estis kompilita de speciala 7membra komisiono jam en 1862. Sed jam en tiu tempo aperis ideoj pri tio, ke por la ĉeĥa lingvo oni devus konstrui tute memstaran sistemon. Kelkaj tiaj stenografioj eĉ aperis fine de la

19a jarcento. Iliaj aŭtoroj estis Antonín Kroudl, Alois Holas, Josef Dürich kaj aliaj.

En la jaro 1920 unue aperis la nun uzata sistemo de d-ro Alois Herout kaj ing. Svojmír Mikulík. Unu jaron poste ĝi estis oficiale enkondukita en ĉeĥoslovakajn lernejojn. La alta kvalito de tiu ĉi sistemo kaj eminenteco de ĉeĥaj stenografoj estis pruvida pasintjare, kiam per stenografio de Herout-Mikulík estis skribite 160 vortojn dum minuto. Ankaŭ estas eldonitaj alfaroj de tiu ĉi sistemo por la plej gravaj mondlingvoj, inter ili ankaŭ por Esperanto. Oni povas prave supozi, ke la HM-stenografio longe servos al ĉeĥaj kaj slovakaj stenografoj, kiam la Gabelsbergera servis al ili dum tiom da jardekoj. Estas laŭdinda fakto, ke niaj plej bonaj stenografoj-praktikuloj ne konservas la sekretojn de sia sukceso por si, sed konigas ilin al aliaj en la ĉeĥaj bultenoj "tĕsnopisné rozhledy" kaj "Tĕsnopisné listy". Memkompreneble, ke iliaj spertoj kaj konsiloj validas ne nur la ĉeĥaj, sed ankaŭ por alilingvaj stenografoj.

Esperantaj stenografaj sistemoj aperis jam en diversaj landoj kaj de diversaj aŭtoroj. Ili estis plej ofte bazitaj sur iu nacilingva sistemo, sed ankaŭ ne mankis sistemoj pli-malpli originalaj. Glora fakto por stenografoj-Esperantistoj estas, ke jam la unua Esperanto-kongreso en Boulogne-sur-Mer estis stenografe protokolita. La merito apartenas al svisa Pastro Frederiko Schneeberger, kiu notis la traktadojn per sia alfaro de germana sistemo Stolue-Schrey. La protokolo estis eldonita libre.

Estas dezirinde, ke ĉiuj Esperantistoj lernu Esperantan stenografion. Kondiĉoj por tio ekzistas, restas nur utiligi ilin kaj eklerni la arton de rapideco kaj lerteco.

Adolf Staňura, OSTRAVA.

Gesamideanoj, kiuj interesiĝas pri Esperanta alfaro al ĉeĥoslovaka sistemo de Herout-Mikulík ellaborita de Adolf Staňura, Tábořská 42, Ostrava-Radvanice, turnu vin pri informoj al Esperanto-Asocio de Ĉeĥoslovaka respubliko, Malá Štěpánská 7, Praha II, aŭ rekte al la aŭtoro. Tiun ĉi alfaron eldonis prese Esperanto-Asocio de ĈSR.

Por ĉiu io!

PODPORY NA OBĚŽNÍK:

Do konce března přispěli finančně na náš oběžník tyto samideáni:

Karel Hájek, Staré Hodějovice u Č.Budějovic - Kčs 20,-

Adolf Staňura, Ostrava - Kčs 50,-

František Strumínský, Šumbark u Ostravy - Kčs 53,-

František Svačina, Lanžhot - Kčs 50,-.

Všem těmto dárcům mnohokrát děkujeme a věříme, že i ostatní samideáni, kteří mají zájem na udržení esperanta v ĈSR a hlavně jeho rozšíření mezi mládež, budou následovat tyto první "vlastovky". Všem dalším děkujeme již předem!

000000

SOUTĚŽ ZK ROH POŠTOVNÍCH ZAMĚSTNANCŮ:

V celostátní soutěži Svazu zaměstnanců pošt o vzorný závodní klub, za účasti 75 soutěžících, se umístil ZK ROH poštovních zaměstnanců v Č.Budějovicích na 5. místě. Přičinili se o to i naši členi, zvláště mládež. Výbor JUNULARA vyzývá všechny členy JUNULARA i starší samideány k větší činnosti, abychom se v příštím čtvrtletí umístili ještě lépe. Nespěte na vavřínech a vzhůru do dalšího kola!

XXXXXXXX

Vyzýváme všechny členy našeho klubu!!! Navštěvujte naše schůze, jež jsou každý čtvrtek v místnosti ZK ROH poštovních zaměstnanců, proti nádražní poště. Od 19-20. hod. schází se JUNULARO a od 20-22 hod. je schůze klubu s programem. Přiveďte s sebou nové zájemce o esperanto!

XXXXXXXXXX

JIHOČEŠI, PIŠTE DO OBĚŽNÍKŮ, VŽDYŤ JE VÁŠ!

VVVVVVV

Ni petas pri pardono ĉiujn gelegantojn, ĉar kulpe de nia preskoboldo ni publikigis unu ĉapitron el romano "La Verda Koro" de Julio Baghy, kiu estis jam presigita en cirkulero de Třebíč "FRATECO" Precipe, Třebíčanoj, pardonu afable nian eraron! Dankon.

Post laboro la humoro:

VORTEO:

GALANTA - estas homo, kiu forlasas socion, kiam li furiozas.
HERBARIO - velkintaj floroj.
IDEALAJ - neplenumigintaj deziroj.
KUNTURO - maldika homo.
OPTIMISTO - viro, kiu centoble strekas per fajrilo, ol li uzos alumetojn.
PROCENTO - du nuloj inter streko.
REVIZORO - sinjoro, kiu faras ĉagrenaĵojn.
SIMETRIKA - viro, kiu lamas per ambaŭ piedoj.
VEGETARIANO - homo, kiu perdis viandkuponaron.

0o0

Inter krokodilo kaj homo estas tiu diferenco, ke krokodilo, kiam faras ion malbonan, ploras.

Mensogo estas malboneco, sed dume ne estis inventita io pli bona por masko de vero.

Plej granda biblioteko ekzistus, se oni kolektus ĉiujn librojn elpruntitajn kaj neredonitajn.

Plej nallonga konfeso de amo estas longa kiso.

Profesoro: "Studento, klarigu devenon de roso".

Studento: "La roso devenas tiel, ke tero tiel rapide turniĝadas, ĝis ĝi ŝvitiĝos.

"Ĉu vi jam ĉesis kun kantado?"

"Jes - doktoro malpermesis tion al mi."

"Ĉu li loĝas apud vi?"

En vagonaro

"Pardonu, vi foresis elvagoniĝi, vi veturis unu stacion pli multe!"

"Ho, tio ne gravas, venonte mi elvagoniĝos unu stacion pli frue."

Eldonas senpage, laŭbezone ZK ROH poštovních zaměstnanců Č. Budějovioe,
ESPERANTO-sekcio. Redaktas komitato de ESPERANTO-JUNULARO, Č. Budějovice.
Korespondadreso: ESPERANTO-JUNULARO, Šumavská 250, Č. Budějovice, ČSR.